



Kulturaj Kajeroj

Ĝ MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, EPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
Bonfara : 10 fkoj / C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JULIO - AŬGUSTO

1963

4

KULTURAJ KAJEROJ

1963

Julio - [~]Augusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rocheport-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

Kelkaj pensoj (P. Babin).

Esperanto tra la Mondo

Ei ie en la mondo

Samarkand (III) (P. Poliščuk).

Moderna migrado (B. Cheverry).

Rilato de pedagogo kun la gepatroj (Pal Balkanyi).

Kelkaj gravaj datrevenoj

Korko (M. de Waard).

Urĝa operacio (send. P. Guillot).

Por via distro.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Kelkaj Pensoj

Antaŭ kelkaj semajnoj ĉiuj el vi povis legi en la gazetoj ke budista monaĥo sin bruligis sur placo en Sud Vjetnamio. Kial? Ĉar li deziris sin oferi por la triumfo de ideo. Kial li elektis tian rimedon? Por altiri la atenton de la popolo al grava problemo. Tia sinofero estas sufiĉe malofta, sed tute ne nova. En la malnovaj tempoj jam gejunuloj oferis sian vivon al la dioj, por altiri iliajn bonfarojn sur la urbon aŭ la landon.

Sed ne ĉiam memvolaj estis tiuj vivoferoj. La antikva historio prezentas multajn kazojn tiajn. Ĉiu fondado estis akompanata de buĉferoj, kiuj estis des pli imponaj, ke la proponita laboro estis pli grandioza. Nur memoru Romulus, kiu mortigis sian fraton sur la ĵus komencitaj remparoj de la estonta Romo. Pli proksime, ĉu Hitler ne deklaris, ke la grandeco de la lando estis certigita pro la imponeco de la buĉado? Kelkfoje la granduloj mortigis sian heredanton, filon aŭ fraton, ne nur pro maltrankvilo pri la heredo, sed ankaŭ ĉar des pli granda estis la ofero. Tiajn oferojn oni povus ankaŭ konstati en la primitivaj popoloj, kiuj konsideras la fekundecon kaj ĉefe la postvivon de la naskitoj, kiel bonfaron de la dioj. Konsekvence parto de tiu donaco revenas al la dioj mem. Ĉu ankoraŭ nun, en civilizaj socioj, religiaj familioj ne konsideras devo la oferon de filo aŭ filino al Dio, feliĉe ne mortigante lin aŭ ŝin sed farante ilin pastro aŭ fratino? La sango ne plu fluas en la temploj sed ĉu oni ne devus tremeti, kiam admirante antikvajn akropolojn aŭ marmorajn templojn oni pensas, ke la homa sango ruĝigis la ŝtonojn? Kiam Romo estis minacata de Haniĉalo, la senato ordonis, ke oni enterigu vivajn viktimojn. Eĉ pli proksime al ni en gravegaj cirkonstancoj ligitaj je timo, la homamasoj retrovis la kruelajn rezonadojn de la primitiva men-

sostato. Kiel ekzemplojn mi nur citu, en Francujo, la Nokton de la Sankta Bartolomeo (1572) kaj la Buĉadon de Septembro (1792).

Tiuj ekzemploj montras, ke la ideologio ŝanĝigas sed restas la komplekso, la komplekso de Abrahamo. Kompreneble oni ne plu oferas la vivon de infanoj aŭ gejunuloj, ĉar la rajtoj de la patro super siaj infanoj malgrandiĝis. La konflikton inter patro kaj filo, virecon, ĵaluzon, malfidon, anstataŭis iom post iom amemaj sentoj. Sed elpelita el la familia vivo la komplekso de Abrahamo rifuĝis en la kolektivan vivon. La antikvaj motivoj ne plu estas akceptitaj. Ili estas « nobligitaj » kaj fariĝas kolektivaj.

Ŝanĝinte siajn pravigojn, la komplekso de Abrahamo ŝanĝis ankaŭ siajn viktimojn. La buĉfero de la novnaskitoj kaj infanoj al la dioj estis anstataŭita de tio, kion Prof. Bouthoul nomas « prokrastitan infanmortigon » : oni nun buĉferas junajn virojn okaze de militoj civitaj aŭ internaciaj. La estroj ludas la antikvan rolon de la patro. La plej grandaj ŝtatestroj aŭ militestroj estas tiuj, kiuj prezidis la plej grandajn amasbuĉadojn. Ŝajnas, ke ĉiu generacio testamentas al la sekvanta heredaĵon de estontaj konfliktoj. Ĝi heredigas ankaŭ la buĉilajn kaj la sociajn strukturojn naskantajn militojn.

Kion ni heredigos al la venonta generacio? Tro grandan mondan loĝantaron, kaj la taŭgajn mortigilojn por solvi la problemon. En la tempo kiam oni multe parolas pri la infan-rajtoj, pri la infan-protektado, pri la lukto kontraŭ la infanmortado, ĉu ni rajtas fieri, ni, kiuj senmove atendas antaŭ la preparado de giganta « prokrastita infanbuĉado »?

Pierre BABIN.



Esperanto tra la Mondo



ESPERANTO TRA LA MONDO

Vi estas invitata...

...Ĉeesti la nacian kongreson de la italaj esperantistoj, kiu okazos en Saint-Vincent, Aosta Valo, inter la 14a kaj la 19a de septembro.

Skribu al: « Itala Kongreso de Esperanto », Centro Congressi, Saint-Vincent, Aosta Valo, Italujo.

Kongreso de la fervojistoj

400 fervojistoj esperantistoj, el 18 landoj, kongresis en Stoke-en-Trent (Britujo). Nova esperanto-strato estis inaŭgurita. La kongreso de 1964 okazos en Bruselo (9-15an de Majo).

Esperantlingva filmo prepariĝas

En Parizo, S-ro J.-L. Mahé, helpata de konataj esperantistoj, interalie de S-roj Flego, Marc Darnault, S-ro Jana Flego-Ravšelj, k.t.p. preparas longdaŭran 16 mm. filmon en esperanto nomata: « Angoroj ».

Por la universala kongreso de 1964

Sia Moŝto Reĝino Juliana, akceptis la inviton fariĝi la Alta Protektanto de la 49a Universala Kongreso en Den Haag (Nederlando), kiu okazos komence de aŭgusto 1964.

Literaturaj novaĵoj

— Ĵus aperis kiel n° 3 de la serio « Oriento-Okcidento » de UEA, traduko de la filozofia romano de Jean-Paul Sartre: « La naŭzo ».

— La romano de Julio Baghy « Printempo en la aŭtuno » aperis ĉe Editions Regain, Monaco, en franclingva traduko.

— En la 3a numero de la revuo « Monda Kulturo », oni listigis 37 romanojn verkitaĵojn originale en la Internacia Lingvo, de 19 aŭtoroj de 10 nacioj.

Trafa rebato

La junia numero de « Kuriero de UNESKO » (kiu aperas en 500.000 ekzempleroj kaj en 8 lingvoj), publikigis respondon de D-ro Lapenna al stulta letero de leganto pri esperanto. Krome, la sama numero entenas sur la sekvantajn paĝojn, reproduktajn de desegnoj de Botticelli kiuj ornamas la baldaŭ aperontan esperantan tradukon de la Dia Komedio de Dante.

Esperanto uzata de Ĉinio en ideologia debato

En la nuna ideologia debato inter Sovet-Unio kaj Ĉinio, tiu lasta lando uzas ankaŭ esperanton por konigi sian starpunkton. Jam la oficialaj servoj de Pekin eldonis almenaŭ 9 broŝurojn pri tio, en la internacia lingvo (antaŭe, aperis 7 raportoj aŭ paroladoj Maŭ Zedong kaj tri aliaj politikaj broŝuroj).

Universitataj kursoj en Pekin

Malfermiĝis du pliaj esperanto-kursoj en la ŝtata Ĉina Universitato, kiel fakultata lernobjekto. 122 personoj partoprenis la kursojn (studentoj, instruistoj, oficistoj de la universitato).

Aliaj sukcesoj en Universitatoj kaj altlernejoj

— En Bulgario, oni anoncas enkondukon de esperanto en la universitaton de Sofia, en la superan Ekonomi-financon Instituton de Sviŝtov, en la Superan Ekonomian Instituton de Varna.

— En la Universitato de Moskvo, studentino preparas disertacion pri « romidaj elementoj en la internacia lingvo ». Lastempe, similaj faktoj okazis en nederlanda universitato.

— Baza kurso de esperanto Funksciis en la universitato de Caracas (Venezuelo).

— Ekde tiu jaro, la internacia lingvo estis regula fako en la somera universitato de Lapelnranta (Finlando).

Papa encikliko aperas en esperanto

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista baldaŭ publikigos en esperanto la enciklikon de papo Johano XXIII « Pacem in Terris ». Oni antaŭvidas disdonon de tiu broŝuro al partoprenantoj de la ekumena koncilio (kun latinaj klarigoj).

Bela libreto pri Primoŝten

Aperis lasttempe ilustrita libreto trilingva (esperanto-franca-germana) pri la somera libertempa restadejo de Primoŝten, ĉe Adriatika maro, en Jugoslavio, malfermata al la esperantistoj de ĉiuj landoj. Tiu libreto estas bona propaganda instrumento por interesi la vojaĝemajn personojn kaj la junularon pri la praktikaj eblecoj de nia movado.

La jarlibro de U.E.A.

La unua parto de la jarlibro 1963 de Universala Esperanto-Asocio aperis. Kiel kutime krom la adresoj de 3.197 delegitoj de 64 landoj, ĝi entenas amason da interesaj informoj por esperantistoj. Ĝi estas ankaŭ ne malhavebla ilo en la manoj de niaj propagandistoj la listo de la delegitoj, kiuj permesas rektajn kontaktojn eksterlande ĉiam favore impresas.

Revuo « Homo kaj Kosmo »


La dua numero de tiu interesa scienca revuo aperis. Adreso : Astronomia Observatorio, Zagreb, poŝtfako 165, Jugoslavio. Petu provkzempleron kaj abonon ĝin ! (Ĝi aperas kvarfoje en la jaro).

El ie en la mondo

SAMARKAND (III)

En la XV-a jarcento loĝis en Samarkand granda uzbeka poeto Aliser NAVOI. Tie li multe laboris kiel poeto kaj studis diversajn sciencojn.

Komence de la XVI-a jarcento Samarkand ne plu estis la ĉef-urbo kaj cedis la lokon al Buhara. Tamen ĝi daŭre restis granda urbo, kie dum tioma tempo la regado apartenis al apartaj regantoj.



Ornamita enirejo de unu el la maŭzoleoj de ŝaki-Zinda

En la XVI-a jarcento ricevis sufiĉe grandan disvolvigon humanecaj sciencoj en uzbeka kaj taĝika lingvoj. La literaturo de tiu periodo superis la literaturon de pasinto. Daŭris la tradukado de libroj en uzbekan lingvon, inter ili la tradukado de la pri-historiaj. La medicina scienco atingis altan nivelon en sia disvolviĝo kaj specialeco. Tiutempe,

en Samarkand estis sufiĉe disvolvitaj diversaj metioj, precipe forĝmetio, potista, teksta, konstrua, tajlora metioj, produktado de manĝaĵoj kaj la produktado de papero. Ankaŭ estis produktata municio por armeo.

Komence de la XVII-a jarcento, Samarkand, kiel aparta apanaĝa regno, estis la parto de Uzbeka ŝtato. La ĉefurbo de tiu-ĉi ŝtato restis Buhara, Jalangtuŝ fariĝis preskaŭ sendependa reganto de Samarkanda Vilaĝeto. En siaj manoj li koncentris grandegan kvanton de sklavoj kaj same grandegaj materiajn riĉaĵojn. Je kosto de Jalangtuŝ estis konstruitaj du medreseoj en Samarkand.

La XVIII-a jarcento estis por Uzbekistan la tempo de politika, ekonomia kaj kultura regreso. Sekve de internaj malordoj kaj invadoj de nomadaj triboj, Samarkand treege suferis, kaj en 20 jaroj de XVIII-a jarcento la urbo dezertiĝis.

Komence de la XIX-a jarcento, Samarkandon estis transloĝigitaj loĝantoj de kelkaj najbaraj urboj: tiam en la urbo estis formitaj 24 novaj loĝkvartaloj (guzar-oj). Denove en Samarkand ekbolis la vivo. La etnika konsisto de la loĝantaro estis tiam sufiĉe diversnacia. Ĉi-tie loĝis uzbekoj, taĝikoj, irananoj, araboj, hindoj, ciganoj, ĉinoj, hebreoj kaj reprezentantoj de aliaj nacioj.


Pri ĝenerala aspekto de la urbo post ĝia loĝatigo kaj restarigo de konstruaĵoj, oni povas juĝi ĉefe laŭ la pli malfruaj priskriboj. Unu el la partoprenintoj de la delegitaro en Buhara-n, en la jaroj 1841-1842, la orientologo N.V. Hanikov donis koncizan priskribon de la ekstera aspekto de Samarkand. Laŭ liaj atestoj, la tuta urbo estis ĉirkaŭita per altaj muroj, havantaj turojn kaj ses pordegojn. Nokte, la eniro en la urbon kaj eliro el ĝi, estis malpermesata. La perimetro de la urbaj muroj estis 13,9 kilometra, kaj la ĝenerala urba areo atingis 10,4 kilometrojn. En la urbo estis multe da ĝardenoj, granda reto da irigaciaj kanaletoj kaj artefaritaj akvorezervujoj, pri gastejoj (karavansaraj) kaj tri banejoj. Mallargaj, negrandaj stratoj enfluis en grandajn bazarajn ĉefstratojn, kiuj kunligis ses urbajn pordegojn kun la placo Registan. La plej vigla parto de la urbo estis la strato

inter la moskeo BIBI-HANYM kaj CORSU. La citadelo troviĝis en la okcidenta parto de la urbo kaj havis trikilometran muron, havantan du pordegojn. En la citadelo troviĝis soldataj kazernoj kaj palaco de Hano. La palaco havis tegmentitan galerion. Tiel aspektis Samarkand antaŭ ĝia ligo al RUSIO...

Sed miaj revoj ne tuj efektiviĝis. Mi ne sukcesis ĝui la vidindaĵojn de la urbo, dum preskaŭ tuta mia estado en Samarkand. Mi estis tre okupita, kaj nur veturante per aŭtomobilo al mia laboro, kaj poste reen al la gastejo, mi vidis kolosajn ruinojn de la moskeo BIBI-HANYM, turojn de Registara placo kaj mirindan, laŭ sia beleco, kupolon de maŭzoleo GUR-EMIR. Ŝajnis, ke mi forveturos ne vidinte la trezorojn de antikva uzbekaj po-

ni nepre dediĉos al Samarkand ».

Kiel belega neripetebla estis la tago de nia vagado tra la urbo de ni sopirata ! Ni iris tra la stratoj de la urbo kaj babilis en Esperanto, kaj la preterpasantoj rigardis nin kun miro flustrante : « Rigardu, ĝen estas venintaj en la urbon italoj ! Kiel belsona estas la lingvo itala ! ». Ni ne povis viziti ĉiujn vidindaĵojn, kaj post mallonga interkonsiliĝo ni decidis nin direkti al la granda bazaro, por samtempe mortigi du leporojn : viziti la restaĵojn de la moskeo BIBI-HANYM kaj iom matenmanĝi ĉar estis nur la oka matene. Dirite, farite ! La granda bazaro nin regalas per bongustega sengrajna vinbero, kiu estas nomata « kiŝmiŝ ». Ni aĉetis aromajn ĵus bakitajn uzbekajn platajn panojn kaj eniris en la tesalonon por uzbekma-



Restinta Kupolo de la Moskeo Bibi-Hanym

pola arto... Sed ĝen je la sesa matene, min vekis hotela servisto : « Kamarado Polišćuk, al vi venis gastoj el Taŝkent ». Apenaŭ frotinte la okulojn, mi fulmrapide min vestis kaj elkuris el mia ĉambro. Hura ! En la vestiblo de la gastejo, sidis miaj karaj geamikoj esperantaj : Benita Kärt el Estonio kaj Janitis Abramoviĉ el Latvio. Ambaŭ fervoraj geesperantistoj, pensiuloj, tamen viglaj kaj plenaj je vivo. La unuan trankvilan vorton, kium mi aŭdis de ili, post entuziasma reciproka salutado, estis : « Tiun ĉi tagon de nia renkontiĝo,

niere matenmanĝi. Ĝuinte la mangadon, satigintaj ĝis limo, ni malrapide iris al la moskeo BIBI-HANYM... Iam ĝi estis la katedrala preĝejo-moskeo, sed bedaŭrinde, konserviĝis nur kolosaj kolonoj de la enirejo, ruinoj de tri kupolaj konstruaĵoj kaj angula preĝturo. Sed eĉ ruinigita neripareble ruinigita, tiu-ĉi moskeo neforgeseble impresas per la majesteco de siaj formoj, per la pompeco de sia dekoracia ornamo.

(Daŭrigota).
Petro POLIŠĆUK,

MODERNA MIGRADO

De post la fino de la 19-a jarcento, la turismo progresis mirinde, enkondukante novan industrion, kaj ni inklinas pensi, ke tiu fenomeno estas tute nova. Ĉu la homoj atendis la modernajn trafikilojn por vojaĝi? Tute ne; jam de longa tempo okazis translokadoj.

Jam en la tempo de malnovaj civilizacioj okazis internaciaj kaj interrasaj renkontigoj. Verdire en tiuj tempoj oni plej ofte havis la okazon viziti malproksimajn landojn okaze de konkeradoj, invadoj, aventuroj, misioj, koloniismo. Kelkafoje la motivoj de tiu intermiksado de la antikvaj popoloj restis misteraj, ekz. tiu de pra-kolombia Ameriko kun la popoloj de la Nilo regiono, aŭ la Bizancaj alportoj al la Roma civilizacio. Sed aliajn kaŭzojn oni bone konas, ekz. la tiel nomitajn « kuregon al la oro », kiu dum la lasta jarcento jetis multajn eŭropanojn al Usono. Pro multe pli gravaj motivoj, ekzilitoj, rifuĝintoj, translokitaj personoj, reprezentas ankaŭ movigantan mondon. Fakte migrad-movadoj, ligitaj al politikaj, kulturaj, religiaj kaŭzoj aŭ tute simple al la bezono « perlabori sian panon » estas historiaj faktoj; la historio askas ilin kaj ili estigas la historion.

Tute malsimila estas la moderna fluado de internacia turismo. La turisto transiras landlimojn por satigi sian deziron pri ŝanĝo, ĝuo, ripozo en diferenca vivmaniero, pli ofte ol por labori, studi aŭ praktiki profitodonajn aktivajn. Sendube, jam de longe, tia turismo havis adeptojn. En antikva Grekujo, facila navigado tra multnombraj insuloj, la multeco da sanktejoj dediĉitaj al gedioj kaj da termofontoj, la olimpiaj ludoj, helpis al la translokado de la tiamaĵ homoj. Same en Romo kaj en la tuta romana Galio, la disvastigo de bonaj vojoj, la kulto de gastigado, kaj, logika sekvo de konkeradoj, la emoj al trapenetado de la novakiritaj terenoj kaj medioj ekdisvolvis la plezur-vojaĝojn.

Dum la Mez-epoko, pro vetur-malfacilaĵoj kaj nesekureco sur la vojoj, deviga turismo por negoco, studado aŭ sanigado, anstataŭis la plezur-turismon. Ankaŭ pro forta religia kredo amasoj da homoj translokiĝis al famaj pilgrimejoj: al Jerusalemo aŭ Romo, al Sankta Jako de Kompostelo en Hispanujo, al Sankta Marteno de Tours en Francujo.

La 17-a jarcento ekmontris aventuran etoson, intelektan kuriozemon al foraj malkovroj kaj al nekonataj landoj. Iom post iom kalesoj, poŝtveturiloj, transportservoj kaj la plibonigo de la vojoj ebligis longajn vojaĝojn. Oni bone scias, ke de la 18-a jarcento mar-banoj kaj kazino-ludoj konis furoron.

Jaron post jaro la evoluo de la vojaĝ-rimedoj amplekse akcelis la ripoz-amuzajn migradojn. Dum la lasta dudeko da jaroj la nombro de motorcikloj kaj aliaj duradaj veturiloj multiĝis. Ankaŭ la nombro de la aŭtomobiloj. Vagonaroj, ŝipoj kaj aviadiloj transportas pli kaj pli da personoj, kaj la aŭtoĉaroj ebligas vojaĝojn pli kaj pli oportunajn kaj malmultekostajn. La disvolvigo de tiuj aŭtoĉaroj multe kontribuis al la intensigado de la organizitaj vojaĝoj por populara turistaro. Plue la ĝeneraligo de la pagitaj libertempoj, de la socia assekuro, liberigas la familiojn de ŝpar-zorgemo kaj permesas ilin profiti feriojn. La helpo de la publikaj oficoj, de la fervojaj kompanioj pere de popularaj kuponoj,

samtempe kiel la kreado de libertempaj vilaĝoj, junularaj gastejoj, kampadejoj instigas pli multe da vojaĝantoj al pli longaj, pli daŭraj foriradoj, al trapasado de landlimoj.


En iu ajn loko en la mondo oni povas, en nia 20-a jarcento, konstati egan progreson de la turismo. Ĉetere moviĝemo ŝajnas konstanta stato de la homaro, nur la senmoveco de la homoj estas okaza eĉ eksterordinara. « Foriro » estas magia vorto, sinonimo de libereco, ripozo, elmediĝo, forgeso de la ĉiutagaj problemoj. Tiu deziro ŝanĝi la ĉielon, la aeron aŭ la horizonton montras profundan bezonon de la korpo kaj de la menso. Kaj por instigi pli kaj pli al translokado, la moderna turisma reklamo trovas allogajn sloganojn.

La sezona migrado ŝajnas esti kontraŭbato de la movado kiu portas la homojn al amasiĝo en la urboj, reago kontraŭ la trudado de la kolektiva vivo. Plue, notinde estas la fakto, ke la turista movado emas aliri al varmaj marbordoj: tropismo simila al tiu, kiu instigas la hirundojn kaj cikionojn foriri al klimatoj pli mildaj pli sunplenaj.

Sendube ambicio, orgojlo kelkafoje prezidas la furoran modon pri vojaĝoj eksterlanden. Tamen turismo havas noblecon, kiam la deziro renkonti homojn en najbaraj aŭ malproksimaj landoj korespondas al profunda bezono de interkompreniĝo kaj estimado. Por la homaro restas multegaj esploroj sur tera kampo en atendo de interplaneda turismo kaj ni, ĝesperantistoj devas intensigi niajn klopodojn en turismaj fakoj.

B. CHEVERRY.





Sinjoro Leopold Sedar Senghor
Prezidanto de la Senegalia Respubliko
Laŭreato de la Internacia
Poezio-Konkurso

(Photo Info-Sénégal)

Rilato de la Pedagogo kun la Gepatroj

El spertoj de hungara klasgvidanta instruistino

En Hungarlando — simile, kiel en aliaj socialistaj, popoldemokrataj ŝtatoj — oni bone scias, ke la lerneja instruado ne povas esti ia aparta agado. Ĝin devas kompletigi la hejmo, la vivo kaj okupiĝo en la familio, la konduto de la gepatroj al la infanoj. Pro tio jam delonge funkcias la gepatraj komunumoj, kiujn vokas al kunsidoj la lernejoj, por tie kune kun la instruistoj, ĉefe kun la klasgvidanta instruisto (en Hungarujo oni nomas ilin ankaŭ en la mezlernejoj « Profesoro ») ili preparolu la lerneajn kaj lernadajn demandojn, la kondutojn kaj malfacilaĵojn de la lernantoj. Membroj de la gepatra komunumo, plej ofte virinoj — kiuj eble pli multe taŭgas por tio, ol viroj aŭ havas pli da tempo? — regule vizitas la gepatrojn, sed laŭeble vizitas ilin la klasgvidanta instruisto. Pri tia vizito raportis hungara ĵurnalo Nepakarat kaj ties ĉefajn partojn mi konigas nun. Estus interese kaj spertodone, se ankaŭ el aliaj landoj oni konigus tiajn okazojn. Ĝi pruvu, kiel grava estas la rekta rilato inter la pedagogo kaj la gepatroj, parencoj, kiel lernas, vivas, progresas la lernantoj, kie necesas helpo aŭ ŝanĝo! La raporto skribas pri instruistino, profesorino, kiu vizitas la hejmon de sia lernanto Johaĉjo. Post la lernejaj horoj ne estis facile por ŝi supreniri piede tri etaĝojn — kaj eble neniu estos hejme. Ŝi konis sinjorinon Kerekas, ŝi neniam mankis je la gepatra kunveno, sed kelkafoje eĉ aparte venis en la lernejon « por malgranda interparolo ». Oni konis ŝin, kiel benintencan patrino, kiu eĉ sian laborlokon forlasis, por povi pli multe okupiĝi pri sia infano. Kvankam kvarope ili vivis el la salajro de la edzo. Tiel la instruistaro, kiel ŝi mem nun estis embarasita, ĉar ili ne komprenis, ke infano, kiu ĉion ricevas hejme, el tri studobjektoj staras eĉ la mal-

sukceso. Sinjorino Kerekas mem malfermis la pordon. « Ĉu estas denove io malbona ĉe Johaĉjo? » ŝi demandis zorgeme. « Mi vidis en la « avertilo » (kiun la infanoj hejmenportas), ke li en hungara lingvo kaj matematiko staras je malsukceso. Sed bonvolu diri, kion mi faru? Mi eĉ donas mian koron, ke li lernu ». Ŝi parolis rapide, rapsode, eĉ kelkafoje haltis ŝia voĉo. Bonvolu aŭskulti min. Mi ne povas bridi la infanon. Mi ne povas kontroli lin. Ja bonvolu kredi al mi, ke mi laŭvorte lernas kun li la lecionon, se mi scias, kiu estas la tasko. Ĝis tiam li ne rajtas ludi, ĝis la tasko ne estas farita. Nun mi tamen ne scias, kiel li staras en historio, en geometrio, en kie li devas pretigi sin dum la ferio — estis dum la novjara kelksemajna ferio — tempo! —, kvankam mi vizitis eĉ gesinjorojn Balla en la unua etaĝo por demandi ĝin? Lastfoje, kiam li denove hejmenportis avertilon, mi tiel batis lin kun la polvofrapilo, ke oni povis vidi sur li eĉ post du semajnoj... Bonvolu do diri, kion mi faru? Iel oni ja devas disciplinigi lin ».

En la malgranda netkajero apud la nomo de Johaĉjo Kerekas aldoniĝas naŭ vortoj: « Malforta karakterata infano, oni devas pli bone kontroli lin ». Ŝi interkonsentas kun la patrino, ke kun subskribo de la fakinstruisto de nun en la « lecionakajero » ĉiutage estos enskribita, kie estas la aktuala lernotajo.

« Ĉu helpas al vi tiu ĉi infano? ». La demando estis neatendita, ne kutima. La panjo estis en embaraso. « Li kutimas helpi vi ŝi la potojn, telerojn, kelkfoje suprenportas ankaŭ hejtilon, sed li estas malforta fiziko. Mi pli volonte mem faras ĝin, mi kompatas

lin pri laborigo ». « La instruistino parolas ankoraŭ pri la ĝusta tempodivido — oni ne devigu la infanon, ke li lernu la tutan posttagmezon, li havu tempon ankaŭ ludi, sed li ankaŭ helpu al sia patrino — kaj pri tio, ke sinjorino Kerekes ne dorlotu lin, tiom, ke ŝi eĉ « kvazaŭ la mangaĵon maĉas por li antaŭe ».

Alia vizito : Ĉe familio Halasz ŝi trovas hejme nur la avinon. Loĝejo aranĝita per burĝa komforto. Tri grandaj ĉambroj kun kameno en la angulo. Elegantaj kusenigitaj brakseĝoj, agrablaj tapiŝoj. Tie vivas Petro el la sesa klaso, la « fortulo de la klaso ». Kaj tie li estas tiel malfeliĉa?... Ĉar li estas! Estis ĝuste dum la geometria leciono. La rigardo de Petro Halasz ne estis direktita al ŝi, kiel aliafoje, sed tra la fenestro ien en la malproksimon. Tiu nekutima afero tiel embarasis ŝin, ke ŝi alvokis lin. La infano ruĝiĝis kaj ektemis. Poste ŝi rimarkis, ke grandaj, grasaj plorgutoj rulas sur lia vizaĝo kaj falas en la geometrian kajoron, ĝuste tien, kie oni estus devinta desegni la rektangulan triangulon. Baldaŭ oni sonoris. La leciono finiĝis. Ili restis nur duope en la klaso. « Ĉu estas ie en neordo hejme? » ŝi demandis. La infano nun jam klinis sin sur la tablon kaj tiel ploris. « Jes, — li respondis plorgeme — miaj gepatroj volas eksdezigi!... Mia panjo ne venis hejmen jam de kvar tagoj kaj mi vane serĉis ŝin en la oficejo, kie ŝi laboras, ĉar ankaŭ tien ŝi ne iras ». — Spontane venis el mia buŝo la demando : « Vi dezirus prefere resti kun panjo? » Tre serioze kaj maljunece li respondis : « Kune kun paĉjo kaj panjo. Mi dezirus, ke ili repaciĝu! »

De tiu tempo ŝi observis Petron. Ŝi vidis, ke hejme ĉio ankoraŭ ne estas ordo. Pri tio ŝi deziris paroli kun la gepatroj. En intereso de la infano. Sed ŝi ne sukcesis. La avino nur malfacile varmiĝis, sed poste — verŝaj-

ne pro amareco sekretigita de la zorgo — trabatis la kluzon de la retenomo. « Mia filo estas tre pacienca homo. Ne pro tio, ĉar li estas mia filo, sed la tuta domo miras, ke ili ankoraŭ vivas kune... ». Ŝi daŭrigas mallaŭte : « Sed pro Dio ne diru tion al iu... Ŝi ne devus iri labori, mia filo estas inĝeniero kun bona salajro. Sed « per ŝi » la mono estas ĉiam nesufiĉa. Mi ĉiam diras al ili, ke ili konsideru almenaŭ la infanon »...


Ŝi bedaŭris, ke ŝi ne trovis hejme la gepatrojn, kaj, ke ĝis nun neniam sukcesis renkonti ilin. Al la gepatra kunveno venis la avino kaj eble dufoje ŝi vidis sinjoron inĝenieron Halasz, sed kiam ŝi eligis el la ringo de la patrinoj, kiu ŝin ĉirkaŭis, ŝi jam ne povis trovi lin. En la notlibreton ŝi enskribas : « Denove iri al gesinjoroj Halasz. Urĝa. » Dufoje substrekis tion. Oni nepre devas diri al ili, ke Petro regresis en pluraj studobjektoj. Ke ilia familia kverelo havas tre malbonan efikon al la infano. Ke ili pripensu ĉiun vorton, kiun ili elparolas antaŭ li, ĉar li ĉion ensorbas terure serioze... Kaj ankoraŭ ion : oni ne povas subaĉeti la infanon per donacoj. Hazardo ŝi aŭdis interparolon de Petro kun ia samklasano. « Kion vi ricevis je Kristnasko? » demandis la alia. « Glitilon kun ŝuoj » — Vi estas bonŝanca. Diru, kion vi ne ricevas hejme? » — « Nur tiĉon, kion mi ne petas » respondis Petro kun tono de infano tre frue maljuniĝinta.

Vesperigis. La profesorino devas ankoraŭ iri aĉeti kaj kuiri vespermangon. Ŝia edzo, distrikta kuracisto, estas jam certe hejme kaj atendas ŝin senpacience ankaŭ ŝia trijara filineto. Jen ankaŭ tiu ĉi tago pasis kaj ŝi estis nur ĉe du familioj. Kaj en la klaso estas sesdekvar infanoj...

(El artikolo de Aranka Bajak rerakontis Pal Balkanyi, Budapest).



GRAVAJ DATREVENOJ




Antaŭ 125 jaroj mortis en Berlino

Aldebert von CHAMISSO (1781-1838). Romantika poeto, naturesploranto, li estis germano. Sed li ĉiam vivis inter du landoj; Germanujo kaj Francujo. Lia libro « Peter Schlemihl », kiu lin famigis, nerekte akcentas tiun fakton. Kiel naturesploranto li partoprenis ĉirkaŭ mondan vojaĝon per ŝipo organizitan de Rusujo. Poste li fariĝis direktoro de la Botanika Ĝardeno en Berlino.



Antaŭ 1 jarcento

Henry DUNANT (1828-1910) fondis la **RUGAN KRUCON**. Tiu viro fariĝis filantropo post la batalo de Solferino, kiun li ĉeestis. Profunde korduŝita de la mizerego de la vunditoj, li provis helpi en tiaj okazajoj. Instige de li, neŭtrala akordo, kiu poste fariĝis la Ruĝa Kruco, estis subskribata en 1863. Henry DUNANT ricevis la Nobel Pacpremio en 1901.



Antaŭ 100 jaroj mortis en Parizo

Eugène DELACROIX (1798-1863). Car li estis konsiderata la plej granda romantika pentristo en Francujo, oni lin alnomis la « Rubens » de la 19-a jarcento. Li preferis pentri motivojn el Oriento, kiujn li realigis per riĉaj koloroj. Krom senvivaj naturoj, pejzaĝoj, religiaj kaj historiaj pentraĵoj, nudajoj, li ankaŭ faris multajn murajn kaj plafonajn freskojn.

KORKO

La bruo, kiun kaŭzas korko, tirata el la botelo, sonas kiel muziko en la oreloj de la vera vinamanto ! Post la ĝuo de la bona vino oni forĵetas la korkon, kiu zorgo ŝtopis la botelon dum aro da jaroj. Hodiaŭ mi deziras fiksi vian atenton sur tiu ĉi modesta ilo, farita el materialo, kiu povas servi la homojn multmaniere.

Korko ja ne taŭgas nur kiel fermilo de boteloj kun ĉiaj fluidaĵoj, kvankam ĝi estas tre utila por tiu celo pro sia rezistemo kontraŭ preskaŭ ĉiu kemiaĵo. Korko servas la homojn en multaj aliaj terenoj : pensu pri la savoringoj, la subteniloj por lernanta naĝanto, la korkaĵoj, kiuj ŝirmas boatojn ĉe kolizioj ; plue la korko ŝirmas nin kontraŭ varmo kaj malvarmo, kiam ni uzas korktavolojn, kiel izoligaj materialoj sur muroj kaj tegmentoj kaj fine korko estas la baza materialo por la bela lino-leumo, kiun ni metas sur la planko en niaj ĉambroj.

Kio estas korko ? Kie oni fabrikas ĝin ? Jen du demandoj, iaforte direktitaj al la teknikistoj. Pluraj personoj vere miris, aŭdinte, ke korko estas naturprodukto !

La ĉefa liveranto de la korko estas kverko, speciale la kork-kverko (*Quercus suber* L.), kiu oni prefere trovas en Suda Eŭropo : suda Francujo, Hispanujo kaj Portugalujo. La granda plimulto de la botelkorkoj venas el tiuj ĉi landoj.

La korktavolon formas la *kambiumo* (la « vivo-tavolo ») de la kverko. Certaj ĉeloj de la *lignohistoj* iom post iom korkiĝas. La dikeco, alkreskanta ĉiujare, varias inter 1-8 mm, sed la unua rikolto ne okazas antaŭ ol la diametro de la arbo estas ĉ 40 cm, kiam la arbo havas aĝon inter 15-30 jaroj. Poste oni povas ripetiti tiun rikolton post 9-12 jaroj. Ju pli aĝa la kverko iĝas, des pli bonkvalitan korkon ĝi liveras, ĝis... la arbo estos ĉ 200 jaroj. Tiam ĉesas la surkresko de uzebla korko.

La unua rikolto liveras korkon kun disfalema karaktero, teknike ĝi estas neuzebla. La forprenado de la korktavolo devas okazi tre zorge, por ke oni ne difektu la kambiuman tavolon de la arbo, tra kiu fluas ĝia vivo.

La forprenitaj tavoloj estas iom rondaj, duone tubformaj. Oni metas ilin kun la interna flanko mal-supren kaj surmetas pezan ŝtonon. La tavoloj tiel platigas. La elasteco de la korkmaterialo permesas tiun rektigon. Poste oni forigas el la korko la mal-puraĵojn, muskojn kaj ŝelojn kaj nun submergas ĝin en varmegan akvon, pro kio la korko fariĝas ankoraŭ pli elasta. Pro tiu ĉi procedo ankaŭ la tanino forlasas la korkon, kio i.a. estas necesa por


ne malbonigi la guston de la vino.

Por teknika uzo, por fari grandajn *plakojn*, uzeblajn kiel izoliga materialo, oni miksas muelitan korkon kun aliaj ŝtofoj, ekz. cemento, kaj kunpremas ĝin per alta forto. Metita sur muroj aŭ tegmentoj ĝi ŝirmas nin kontraŭ la tro varmaj sunradioj aŭ kontraŭ la perdo de varmo interne-eksteren.

Fine mi menciu, ke la ecoj de korko estis jam konataj en la Roma tempo, kiam oni uzis ĝin kiel tegmentkovrilon kaj por fari el ĝi ŝuojn. Sed la plej granda bezono je korko devenas ekde la momento, kiam oni eltrovis la vitran botelon.

Ne forĵetu la korkon ŝtopilon antaŭ ol vi zorge rigardis ĝin, prefere sub mikroskopo !

M. de WAA'RD.



Mia mastro ne forgesis reaboni

Fantaziaĵo

URĜA OPERACIO

Roluloj : Kuracisto (K), Helpistino (H), Policano (P), Filo de la Policano (F).

En la konsultejo de kuracisto ; meze staras longa tablo. Flanke staras malgranda tablo kun instrumentoj ridinde grandaj, botelo de kloroformo kaj ĉarpio. La kuracisto poluras siajn okulvitrojn. Eniras la helpistino, kiu surportas blankan surtuton.

K. : Nu, kio estas ?

H. : Policano estas ĉe la pordo kun sia filo. Ili deziras konsulti vin.

K. : Venigu ilin. (H. eliras kaj revenas kun d'ka policano kaj filo). Nu, kion vi deziras ?

P. : Mia filo ĵus englutis mian fajfilon. (Li montras la ĉenon ĉe kiu mankas la fajfilo).

K. : Englutis la fajfilon ! (Al la knabo) Kial vi englutis la fajfilon de via patro ? (La knabo ne povas paroli. Li eligas nekompreneblajn sonojn kaj montras sian gorĝon).

P. : Li prenis la fajfilon el mia poŝo por ludi kaj dum li blovis la fajfilo subite malaperis.

K. : Rigardu min ! Malfermu la buŝon ! (Li rigardas en la buŝon sed eligas nenion). Ĝi ne estas videbla. (Li frapas lian dorson sed vane). Ni renversu lin. Prenu unu piedon. (K. prenas unu piedon, P. la alian kaj ili renversas la knabon. K. vokas al H). Nun, frapu lian dorson. (Ŝi frapas, vane). Estas senutile ! Mi devas fari operacion, Ni metu lin sur la tablon. (Ili kuŝigas la knabon sur la tablon. K. demetas sian jakon kaj suprenfaldas siajn manikojn). Alportu la instrumentojn. (H. alportas pletton kun instrumentoj).

P. : Ĉu mi povas helpi ?

K. : Jes. Tenu liajn manojn ! (K. malbutonas la jakon kaj veŝton de la knabo. H. proponas al li segilon).

H. : Ĉu vi bezonas segilon ?

K. : (avide) Jes. (La knabo baraktas kaj penas levigi). Ho, mi forgesas kloroformi lin. Kloroformo ! (H. donas al li la botelon kaj pecon de ĉarpio. Li kloroformas la knabon kaj senpense donas la botelon al P.).

P. : (metante la botelon al sia buŝo) : Sanon !

H. : Ne, ne ! Tio estas kloroformo ! (Ŝi forprenas la botelon).

K. : M. kredas, ke la tranĉilo pli bone taŭgos. Tranĉilo ! (H. donas al li grandan tranĉilon. Li akriĝas ĝin per akriĝilo, kaj faras grandan tranĉon en la ventro de la knabo). Prenilo ! (H. donas la prenilon. K. elprenas globeton kaj jetas ĝin la plankon. Li elprenas horloĝon kaj ĉenon, kaj proponas ilin al la policano). Ĉu tio apartenas al vi ?

P. : Ne, ĝi ne estas mia. (K. metas ĝin en sian poŝon. Li serĉas denove kaj elprenas kolringon el perloj. Li donas ĝin al P.).

K. : Kredeble ĝi apartenas al via edzino ?

P. : Ne, ĝi ne estas ŝia. (Al H.) Mi petas, akceptu ĝin).

H. : Multan dankon ! Vi estas tre afabla. (Ŝi surmetas ĝin).

K. : Sed, kie estas la fajfilo ? Ha ! Jen ĝi estas (Li elprenas la fajfilon kaj donas ĝin al P.).

P. : Dankon, dankon. Multan dankon !

K. : (ankoraŭ serĉante). Ŝajnas, ke nenio alia estas tie. Kudrilo !

H. : (donas al li grandan kudrilon kaj li kudras la vundon. Dume P. penas blovi sian fajfilon sed li ne povas sonigi ĝin. K. butonumas la veŝton de la knabo. H. frapetas liajn vangojn por veki lin).

H. : Vekiĝu ! Vekiĝu ! (La knabo sidigas kaj frota siajn okulojn).

F. : Kie mi estas ? Ĉu mi estas en la ĉielo ? (Li ĉirkaŭrigardas). Ho, ne ! Jen estas patro. (Li saltas de la tablo kaj palpas sian ventron). Mi jam memoras. La kuracisto retrovis sian fajfilon ?

P. : Jes, Sed ĝi ne funkcias. (Li penas blovi ĝin, sed, vane). Ŝajnas, ke ĝi estas ŝtopita.

F. : Mi provu !

P. : Ne, vi ne provos. Eble vi denove englutos ĝin ! (Ankoraŭfoje li blovas).

F. : Ne, paĉjo, mi promesas. Donu ĝin al mi, mi petas. (Li penas preni la fajfilon el la mano de sia patro, kiu metas ĝin al sia buŝo kaj subite englutas ĝin. Li tusas kaj faras sufokajn sonojn).

K. : Kio okazis ?

F. : (ĝoje) Paĉjo englutis la fajfilon !

K. : Ankaŭ vi ! Mi rigardu ! Malfermu la buŝon ! (Li rigardas). Ĝi ne estas videbla. (Li frapas lian dorson sed eligas nenion). Ni renversu lin ! Vi, prenu unu piedon ! (F. prenas unu piedon, K. la alian. Ili renversas P. ; K. alvokas H). Nun, frapu lian dorson ! (frapas, sed vane). Estas senutile. Mi devas fari operacion. Ni metu lin sur la tablon. (P. faras protestajn sonojn dum ili metas lin sur la tablon. Li baraktas kaj eskapas. Li kuras eksteren. La tri aliaj personoj kuras post li. Tuj post sia eliro K. revenas, prenas la grandan tranĉilon kaj denove postkuras la aliajn).

Kurteno falas

Sendita de S-ino GUILLOT.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Jen la rezultoj de nia konkurso 1962-1963.

1. F-ino Juliette CARRE (96 poentojn) gajnis la unuan premion, 15-tagan senpagan restadon en Grésillon.
2. S-ro A. GUIMBERT (94 poentojn) gajnis la duan premion, 8-tagan senpagan restadon en Grésillon.
3. S-ino SUCHAREAU (92 poentojn).
4. S-ro LIGOT (90 poentojn).
5. S-nio LAURIE (86 poentojn).
S-ino BENAZET (86 poentojn).
7. S-ro SALASC (85 poentojn).
8. F-ino ARNOULT (84 poentojn).
9. S-ino VINCENT (73 poentojn).
ktp...

La konkursintoj, kiuj petis la solvojn de la gramatikaj problemoj jam ricevis aŭ baldaŭ ricevos ilin. Al ĉiuj konkursintoj ni kore gratulas, kaj ni deziras, ke, venontan jaron, pli kaj pli da abonintoj partoprenu la konkurson. Kaj ni diru : La plej lerta gajnu !

Pierre CHEVALIER.

AMUZAJ PROBLEMOJ :

**Solvo de la lasta problemo :
Sescifera nombro.**

Estu « x » la nombro formita per la kvin dekstraj ciferoj. La nombro estas : $2.000 + x$.

Se oni transportas la ciferon « 2 » de la maldekstro al la dekstro, « x » estas la nombro de la dekoj kaj « 2 » estas la cifero de la unuoj. La nova nombro skribiĝas : $10x + 2$. Tiu nombro superas la primitivan nombron de 133.308. Ni povas do skribi : $10x + 2 = 200.000 + x + 133.308$.

Tio estas la ekvacio de la problemo :

$$10x - x = 200.000 + 133.308 - 2.$$

$$\text{aŭ : } 9x = 333.306.$$

$$\text{do : } x = 37.034.$$

Respondo : la primitiva nombro estas : 237.034.

$$\text{Kontrolo : } 370.342 = 237.034 + 133.308.$$

..

Nova problemo : (S-ro Jarlier).

La ŝippereuloj. — Ŝipo, kiu havis proviandon por 60 tagoj, akceptas 30 ŝippereulojn sur la maro. Estas nun proviando nur por 50 tagoj. Kiom da homoj troviĝis sur la ŝipo antaŭ la renkonto ?

..


Solvo de la ludo : « Bonan vajaĝon ».

Jen la 8 trovotaj eraroj : folio sur la arbo

— etiketo sur la valizo — birdo (tute dekstre)
— la radiator-sirmilo — floro (dekstra malsupra angulo) — ŝtono (meze de la vojo) — sulko (maldekstra parto) — branĉo sur la arbeto.




BONHUMORO



Kia somero !



Abstinemo = Sano



Ili ĉiam postlasas ion !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18 (50 fcs).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : S-ro Lehotkay K. Ferenĉ, ul Petefij eva 27, ZRENJANIN (300 din).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).


Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM S3, Postgiro : 157007.

Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo